

N° 197  
janvier  
février  
mars  
2022

# LA INFORMILO

N° 197  
januaro  
februaro  
marto  
2022

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

esperanto  
France-Est

ESPERANTO  
2022  
Justa komunikado

esperanto  
★ estas ★  
mojosa!

## ESPERANTO

### FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant  
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

### ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €



Les Issambres à Roquebrune-sur-Argens  
Mediterranea Esperanto-Semajno

Une baisse notable des contaminations au COVID (début mars) avait permis le maintien de la rencontre d'espéranto traditionnelle à Les Issambres au bord de la Méditerranée. Une quarantaine d'espérantophones munis de leur pass vaccinal avaient pris le chemin du sud pour le plaisir de se retrouver, de pratiquer la langue internationale et ainsi d'oublier la pandémie.

Si les après-midis étaient réservés à la découverte de la région et les soirées aux talents artistiques divers, les matinées étaient consacrées aux cours et aux conférences.

Ainsi Kristin Tytgat, professeure de russe et d'allemand à l'Institut Erasmus pour Traducteurs et Interprètes de Bruxelles, a prodigué des conseils pour une communication claire et efficace. Car une langue commune (même lorsque les interlocuteurs comprennent et parlent très bien cette langue) ne suffit pas pour décrypter les pièges des différences de culture. Les tensions entre la Russie et l'Ukraine n'ont pas été absentes des débats.

Anne Jausion, professeure de littérature et traductrice, a dirigé des ateliers qui ont fait découvrir aux participants la richesse de la littérature originale en espéranto.

# MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

# 2022



Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

de la 26a de Februaro ĝis la 5a de Marto 2020

Elrigardo el ĉambro

En 2021 tiu tradicia printempa rendevuo ne povis okazi pro la pandemio. Ĉi-jare la organizantoj kuraĝis ĝin refoje proponi kaj organizi. Ni troviĝis en la sama hotelo, kiu nun nomiĝas Miléade (anstataŭ Vacancel) en Les Issambres, inter Saint-Raphaël kaj Saint-Tropez. La nombro da partoprenantoj estis malpli ol dum kutimaj jaroj, sed tamen preskaŭ 50. La etoso estis simpatia.



Post monataj senefektivaj renkontiĝoj estis agrable trovi samideanojn en tiu hotelo de Les Issambres. Jam en tiu sabato (26.02.2022) posttagmeze alvenis pluraj partoprenantoj laŭ la horoj de la regulaj busoj. Sed la unua manĝo en la hotelo estis planita nur por la vespermanĝo. Tio estis okazo esplori laŭ-longe de la mar-bordo pri tagmanĝejo kaj sam-okaze ĝui jam ferian panoramon al la maro. En la hotelo atendis pliaj samideanoj ofte konatoj de antaŭaj jaroj.

Antaŭ la vespermanĝo la nova direktoro kaj la teamo sin prezentis kaj proponis bonvenigan aperitivan.

Dume ni ankaŭ ekkonis la programon de la Esperanto-grupo. Okazis ĉi-foje nur du kursoj, Matene kaj antaŭ la vespermanĝoj.





En la post-tagmezoj estis proponitaj promenadoj, ekskursoj kaj vizitoj al proksimaj urboj. En la vesperoj okazis prelegoj pri Japanio, Belarusio, pentro-arto, limerikoj, filmoj pri vojaĝoj.

En la unua vespero sin prezentis la kurs-gvidantoj kaj la organizantoj anoncis la programon de la posttagmezoj.

Krome sam-okaze ĵurnalistino fotis la grupon kaj verkis artikolon en "Var-Matin".



Pri la kurso pri literaturo de Anne Jausions entuziasmiĝis Bernard. Jen kion li spertis.

### Interesa kurso pri literaturo

Okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno, de la 26a de februaro ĝis la 5a de marto 2022, en Les Issambres, Lazura Marboro, Anne Jausions dum sia ĉiutaga kurso prezentis multajn verkojn originale verkitajn en Esperanto laŭ tute nekutima maniero. Ŝi donis por ĉiu verko nur la komencon de la libro, ĉirkaŭ 15 ĝis 25 linioj. Post legado de la proponita teksto, ni demandis pri la nekonataj vortoj kaj esprimoj kaj konsideris la stilon kaj provis diveni, kie disvolviĝas la rakonto kaj pri kio temas. Sekve ni kune serĉis la aŭtoron kaj la titolon de la verko.

Tio estis ĉiufoje interesa enketo, kelkfoje preskaŭ kiel detektivo, aparte kiam neniu el ni jam legis la libron. Tiel la kursanoj bone partoprenis, dividinte siajn komprenojn kaj sciojn pri la signifoj de vortoj kaj esprimoj, substrekinte diversajn aspektojn de la tekstoj, pri la stilo, vorto-trezoro, gramatikaj formoj. Ni tiel malkovris kaj konsciis, ke la komenco de literatura verko

donas multajn informojn gravajn por kompreni, kelkfoje intuicie, kion la aŭtoro celas esprimi pri sentoj, etoso, pensmanieroj, kutimoj, moroj. Ankaŭ la verkisto priskribas per tiuj unuaj vortoj la naturon, veteron, travivaĵon de la ĉefaj rolantoj, kelkfoje per terura se ne ŝoka prezento de tragedia situacio.



Pro tiom da malkovroj, pri tiuj tekstetoj en la komenco de libro, kiujn oni ofte nur rapide tralegis por decidi, ĉu oni emas daŭrigi legi aŭ ne libron, ni travivis la kurson de Anne Jausions kiel amuzan ludon. Kelkaj kursanoj friponis serĉante per komputilo, ne nur la signifon de nekonataj vortoj sed ankaŭ kiuj estas la titolo kaj la aŭtoro de la libro el kiu estis elŝutita la prezentita teksto.





La kurs-gvidantino sciis bone uzi la demandojn, komentojn, proponojn de la partoprenantoj por riĉigi la kurson. Kaj ankaŭ ŝi lerte akceptis la intervenon de la komputiloj, nome por doni pli da biografiaj informoj pri la aŭtoroj kaj iliaj aliaj verkoj. Ni konstatis, ke la komputilo, fakte interreto, estas interesa ilo por rapidigi serĉadojn, do por pli bone studi la literaturon: ne malmultaj verkoj estas elŝuteblaj parte aŭ tute, kaj oni povas trovi prezentojn de aŭtoroj kaj recenzojn.

La partoprenantoj fine de la kurso interkonsentis, ke ili travivis interesan sperton dum tiu semajno kaj neniam plu legos la komencon de verko laŭ la sama maniero. Oni ankaŭ povis listigi por si mem legendajn librojn.

Bernard Behra

Masevaux, Alta Alzaco, la 12an de Marto 2022.



Okaze de nia vizito al Fréjus Karmen bone klarigis pri diversaj artaĵoj kaj pri historiaj eventoj. En ĉi-tiu parko estas rememoraĵoj pri la katastrofo ĉe la baraĵo de Malpasset en 1959 kun 423 viktimoj.



En Saint-Raphaël ni ĝuis belan promenadon kun la hundino de Karmen Cispa, kiu ankaŭ informas pri Esperanto.



bonan tagon!  
mi nomiĝas Ĉispa  
kiel vi nomiĝas.  
Ĉu vi bone fartas? - jes!  
me!



**Martine skribas:**

Granda ĝojo por ĉiuj revidi unu la alian post du jaroj anstataŭ unu kiel kutime! Kulpas la pandemio, kiu malebligis iun ajn renkontiĝon dum pluraj monatoj.

Finfine ni kuniĝas, sed mankas multaj: ĉu ili estas eksterlandanoj, kiuj ne rajtis aŭ timis trapasi la landlimojn, supozeble iuj ne povis montri atestilon pri vakcinado. Do la kutima grupo el preskaŭ cent homoj reduktiĝis al kvardek, kaj la lerno-grupoj al du, sed tamen je la du plej altaj niveloj (3a kaj 4a). La 4a nivelo estis malpli vizitata ol la 3a, kiel ĉiujare! La tagoj estis dividitaj inter kursoj, promenadoj,



ekskursoj, kantado...

Precipe merkredon estis organizita komentita ŝip-ekskurso al Saint-Tropez. Ni povis ekvidi la palacojn de kelkaj riĉuloj el diversaj landoj. En Saint-Tropez ni povis elekti viziti la muzeon aŭ grimpi ĝis la citadelo.

Vendredon vespere okazis festo. La du grupoj interpretis skeĉojn kaj kelkaj kantis du ĥoraĵojn, inter alie ukrainan popolkanton. Aldoniĝis legado de du poemoj pri paco kaj migrantoj. Ŝercoj kaj limerikoj ne mankis! Kaj finfine estis teatre interpretita noveleto de Sten Johansson, kiun ni titolis "La onta bebo".

La kutima loterio proponita de Monique kaj Simone estis sukcesa.

Ĉiuj pasigis agrablan vesperon kaj esperas partopreni la sekvontan MES en 2023.



**Jen la kursanoj de Kristin Tytĝat, kiu sukcesis allogi ilin dank'al dokumentoj de "Edukado.net"**



Unue ŝi parolis pri internacia komunikado eĉ inter esperantistoj. Venis ankaŭ la temo pri rilatoj inter Rusio kaj Ukrainio de post la falo de Sovetunio.



Helpe de edukado.net ŝi proponis plej diversajn gramatikajn ekzercojn.





En iu posttagmezo ni vizitis Roquebrune-sur-Argens. Ĝi situas parte ĉe la marbordo sed ĉefe en la montaro. Malnovaj domoj, mallarĝaj stratetoj emocie beligas la urbeton. Tie okazas ĉiu-jare festo de ĉokolado. Ni povis ĝui la viziton al la muzeo de la ĉokolado, kie eblis vidi ege malnovajn afiŝojn kaj reklamojn pri ĉokolado.



Revenis rememoroj pri foraj jaroj.



Jen la lasta vespero kun skeĉoj, humuraĵoj, deklamado, koruso kaj dankoj al la organizantoj, al deĵorantoj kaj al ĉiuj ĉeestantoj.



La organizantoj kuraĝis proponi tiun semajnon al la samideanoj, kiuj favore respondis kaj venis kun la espero, ke tiu aranĝo okazu ankaŭ en venontaj jaroj.



# KONGRESO ESPERANTO-FRANCE 2022

## de ĵaŭdo la 26-a ĝis dimanĉo la 29-a de majo 2022



En la jaro 2022 la *Interasocia Kongreso de Esperanto en Francio* okazos en la verda Perigordo, fama pro ĝiaj trufoj, ĝia kuirarto, ĝiaj mil kasteloj kaj la dolĉa vivo, kiun homoj ĝuas ekde la pratempo.

La kongreso okazos **de ĵaŭdo la 26-a ĝis dimanĉo la 29-a de majo**

2022, en la socikultura centro de Trélissac, 827 strato Eugène-Le Roy (proksime de la preĝejo). Ĉi tiu grandega konstruaĵo enhavas multajn salonojn, iuj tre grandaj, taŭgaj por kunvenoj de grandaj kaj malgrandaj grupoj.

Multaj programeroj estas planitaj: konferencoj, labor-grupoj, ekskursoj, preparado por ekzamenoj, libroservo, koncertoj, manĝoj, aldone al renkontiĝoj, oficialaj kaj aliaj, de Esperanto-France kaj de aliaj grupoj.

Venu en Perigordon, vi ne enuos!

### Abunda programo kaj krome pluraj proponitaj Ekskursoj

#### Ĵaŭde, 26a de Majo 2022

Akcepto  
Ekskurso 1 historio de Perigordo 9 €  
Vespermanĝo libera  
Vespere: Prelego pri la grotoj de Lascaux

#### Vendrede, 27a de Majo 2022

Akcepto  
Esperanto-kurso  
Kunvenoj: grupoj, federacioj  
Malfermo, honor-vino  
Tagmanĝo libera  
Ekskurso 2 al Lascaux 40€  
Ekskurso 3 al Kasteloj de Bories 9€  
Vespermanĝo bufeda  
Konferenco de Christian Grenier:  
Prahistorio en scienc-fiksia literaturo

#### Sabate, 28a de Majo 2022

Matene: Ĝenerala Membro-Kunveno de Esperanto-France  
Ludoj  
Tagmanĝo: pikniko  
Estrar-kunveno de EF

Ekskurso 4 (Perigordo Romia epoko) 9€

Konferenco de Philippe Bigotto:  
La sekreto de la Lascaux-arbaro  
Kunvenoj aliaj federacioj  
Vespermanĝo libera  
Vespere: Koncerto


#### Dimanĉe, 29a de Majo 2022

Libroservo  
Kunvenoj aliaj federacioj  
Fermo, aperitivo de amikoj  
Tagmeze: Pikniko  
Posttagmeze libera



### LIEU DU CONGRÈS : Kie okazos la kongreso?

Foyer socio-culturel  
827 rue Eugène-Le Roy (près de l'église)  
24 750 Trélissac  
GPS : N45.19581, E0.77909



Aliĝilo kaj programo ĉe:

[http://esperanto-gep.asso.fr/kongreso\\_2022/](http://esperanto-gep.asso.fr/kongreso_2022/)

Informo-petoj: skribu al [info@bartsch.fr](mailto:info@bartsch.fr) aŭ al [kontakto@esperanto-gep.asso.fr](mailto:kontakto@esperanto-gep.asso.fr)

François Bartsch  
Chauzanaud  
24420 Savignac

<b>Espéranto France-Est</b> http://esperanto.france.est.free.fr.				<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>	
<b>La Informilo</b>		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>	
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					
<b>Komitato de la Asocio</b>			<b>Comité de l'Association</b>		
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso		
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr		
Sekretario kaj Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net		
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag18@sfr.fr		
Aliaj komitatanoj  <i>Asseseurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr		
	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelincolnot@orange.fr		
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net		
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr		
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr		
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello54@gmail.com		
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammbach@gmail.com		
<b>Abono al La Informilo →</b>	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>		
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <b>Paiement par chèque au nom de</b>		
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <b>Paiement par virement au compte</b>		
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY				
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier		
1. Mediteranea Esperanto Semajno 2. Raporto pri MES 3. Raporto pri MES 4. Raporto pri MES 5. Raporto pri MES 6. Raporto pri MES 7. Franca kongreso en 2022. 8. Komitatanoj kaj enhavo-listo 9. Angulo + Libroj 10. Forpasis samideanoj 11. Raportoj de la grupoj 12. Raportoj de la grupoj 13. Estraro-kunveno + Unesko 14. Nia Libro-servo	15. Rakontoj fabeloj 16. Rakontoj fabeloj 17. Abonoj kaj kotizoj 18. Amika tago en Sélestat 19. Enigmo + humuraĵo 20. Humuro per Limeriko 21. Vortludoj en Esperanto 22. Ĉu vivo sur aliaj planedoj 23. Ĉu vivo sur aliaj planedoj 24. TAKE: Konstruado-kajero 25. Prahistoriaj artaĵoj 26. Prahistoriaj artaĵoj + UEA 27. Paska Fontano 28. Nia foto-paĝo	<b>ISSN 0291 6037 trimestriell</b> <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b> Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle <b>Espéranto France-Est</b> MJC PhiJippe Desforges 27 rue de la République <b>54000 NANCY</b> Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b> Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b> <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i>			



## ANGULO DE LA PREZIDANTO

**Estimataj gesamideanoj,****Trafa deklaro de la filozofo Ludwig WITTGENSTEIN (1889 - 1951)**

En la lasta numero de IPR (*Internacia Pedagogia Revuo 2021-4*) mi malkovris la artikolon de Teddy NEE (Tajvano) kaj Cesco REALE titolitan *IKON – lingvo de ikonoj*. La du aŭtoroj citas la filozofon Ludwig WITTGENSTEIN, kiu skribis: “La limoj de mia lingvo signifas la limon de mia mondo”.

Lernante fremdan lingvon, oni rapide konscias, ke la kono de lingvoj ankoraŭ pli vastigas la horizonton kaj ebligas malkovron de aliaj kulturaj spacoj, kaj ju pli bone oni komprenas kaj parolas novan fremdan lingvon, des pli oni profundiĝas en ties kulturon ĝis eĉa sento de samkulturaneco.

Koncerne Esperanton, la aliro al diversaj kulturoj estas ankoraŭ pli bunta, eĉ se tiu aliro al alies kulturo ne estas tiel profunda. Tio ne malhelpas, ke bona kono de Esperanto estas la plej rapida rimedo por intima interkonatigo de diverslingvaj homoj, kio repuŝas la limojn ajnadirekten!

Sed ankaŭ por unulingvuloj la konstato ĝustas: kiu ne regas sufiĉe sian propran gepatran lingvon, nur baze komprenas sian ĉirkaŭaĵon kaj nur baze kapablos partopreni en la funkciado de demokratio.

La konkludo estas: lernadi, lernadi, lernadi lingvojn!!!

Edmond LUDWIG

**LA MALAMIKO DE PUTIN Kalle Kniivilä Mondial****Aleksej Navalnij kaj liaj apogantoj**

Nova pripolitika libro de la finna ĵurnalisto Kalle Kniivilä aperis – kiel antaŭaj libroj-samtempe en la sveda lingvo kaj en Esperanto. La aŭtoro sekvas la agadon de la rusa oponento Aleksej Navalnij de pluraj jaroj. En tiu libro li priskribas liajn klopodojn lukti por vere demokratizaci balotoj kaj kontraŭ korupto en Rusio, akuzante eĉ Prezidenton Putin pri korupto. Navalnij sukcesis interesi rusajn oponentojn, kiam li filmis la luksan palacon, kiun konstruigis Vladimir Putin. Navalnij iĝis ankoraŭ pli konata post la provo lin veneni kaj lia resaniĝo en germana hospitalo. Kvankam li certis, ke la Kremlo respondecas pri la atenco, li decidis reflugi al Rusio, kie ... li tuj estis arestita kaj enprizonigita!

Faru al vi opinion pri tiu batalo inter ambaŭ homoj per tiu libro verkita de esperantista profesia ĵurnalisto. E. L.

*Aliaj esperantlingvaj libroj de Kalle Kniivilä:*

Homoj de Putin  
Krimeo estas nia

La strato de Tanja  
Idoj de la imperio

**La memoraĵoj de Julia Agripina Anna Löwenstein (FEL)**

Niaj legantoj certe memoras jaman romanon de Anna Löwenstein *La ŝtona urbo* priskribantan la vivon de juna keltino en Romo dum la romia epoko (Romano tradukita franclingven de Godeleine Logez kaj de nia samfederacianino Ginette Martin), aŭ alian: *La morto de artisto* pri Nerono.

Ĉi-foje la feministinino rakontas la vivon de Julia Agripina la Juna (filino de Germaniko).

Mi konfesas, ke komence de tiu longa romano (564 paĝoj) mi iom perdiĝis tra la multnombraj rolantoj, kvankam libera folio aldonita al la libro prezentas la genealogion de la diversaj personoj.

Sed iom post iom la legademo estis spronita pro suspenso inda je moderna krimromano!!!

Jesja! La leganto havas la impreson legi la viv-rakonton de mafia familio, kie oni mortigas unu la alian, kie oni sendas la konkurencajn familianojn al ekzilo pro ofte nura timo de rabo de la imperia posteno. Banalas incestaj rilatoj, kiuj utilas por konservi la povon ene de branĉo de la familio. La imperiestro, kiu timegas venenigon (ne senkiale!), ankaŭ sisteme provas manipuli la senaton, ĉefe kiam iuj filozofoj (kiel Seneko) revas pri respublika ŝtato. La mortigitan imperiestron la familianoj poste tamen proponas al diigo, inter la jam multnombraj romiaj dioj. Cetere: ankaŭ astrologiaj konsultoj ofte gvidas la politikon!

Ĉion tion malkovras travive la juna klera kaj kulturita Agripina, kiu ankaŭ ... lernas ĉion tion! Kaj kredu min: ŝi lerte uzas siajn spertojn!!! Eĉ ŝia filo. . . . .

Plion mi ne rakontos al vi! Legu kaj ĝuu tiun interesezan romanon, malgraŭ iuj forgesitaj eraroj.

E. L.



## Forpasis nia samideanino Claude Nourmont (1945-2022) la 25-an de februaro 2020

Forlasis nin Claude Nourmont! Ŝian plurjardekan modelan agadon por Esperanto prezentis plej adekvate la retejo de UEA:

*Claude Nourmont naskiĝis en la franca urbo Rouen la 23-an de oktobro 1945 kaj mortis la 25-an de februaro 2022. Ŝi estis Dumviva Membro de UEA, konstanta Membro de Societo Zamenhof, Honora Prezidanto de TEJO kaj Komitatano de UEA.*

*Ŝi esperantiĝis en 1963. Ekde tiam ŝi aktivis movade, vizitis Esperantorenkontiĝojn, organizis kaj laboregis por Esperanto. Inter 1975 ĝis 1977 ŝi estis prezidanto de TEJO. En 1973 ŝi fariĝis ĝenerala sekretario de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE; nun Espéranto-France); inter 1994 ĝis 2001 ŝi estis prezidanto de UFE. Ŝi prezidis la Lokan Kongresan Komitaton de Montpellier (UK 1998).*

*Ŝi estis Komitatano de UEA ekde 1986 ĝis 2022 kaj Vicprezidanto de UEA inter 2004 ĝis 2013. Ŝi estis redaktoro de Monato (rubriko Arto, 2005-2022), ĉefredaktoro de Le Monde de l'Espéranto (2003-2022) kaj konstanta prizorganto de Kleriga Lundo dum la UK.*

*Ĉiame ŝi restos en nia memoro, kiel tre bonkora persono kun eterna emo kontribui, helpi, animi, pacigi kaj financi. Ŝi estis granda mecenato de Esperanto-agadoj. Kiam aliaj fermis la orelojn, ŝi ofte estis la unua, kiu donacis.*

Sed Claude ankaŭ agadis loke (Luksemburgo) kaj regione kiel anino de Espéranto France-Est. Ĉiam ŝi helpoprete disponigis al ni siajn spertojn por la promociado de nia lingvo.

Kun Brian Moon, ŝia edzo, ŝi dediĉis sian vivon al Esperanto.

Kara Claude, ni ne forgesos la nemezureblan laboron, kiun vi realigis, ni ne forgesos vin!!!

Edmond LUDWIG



## Forpasis eksa prezidanto de Espéranto France-Est François Xavier GILBERT la 23-an de februaro 2020

Samideano François Xavier GILBERT forpasis 88-jaraĝa la 23-an de februaro en 55190 Void-Vacon. Li estis prezidanto de EFE ekde 1996 ĝis 2001. Kiel respondeculo de la Komerco-Ĉambro de la departemento Meuse li agadis ĉefe pri la fakoj ekonomio kaj komerco kadre de IKEF (Internacia Komerca kaj ekonomia fakgrupo) kaj TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj).

Liajn kontaktojn en la branĉo de komerco kaj ekonomio pli ĝenerale li jam uzis antaŭ sia prezidanteco, kiam – en 1992-li sukcesis esperantigi kaj eldonigi specialan plurlingvan numeron (ankaŭ kun Esperanto) de ekonomia broŝuro, kiu entenis repertuaron de produktoj de la departemento Meuse (Kiu faras kion?). Same aldoniĝis Esperanto en la listo de bonveniga broŝuro de la komercistoj ankaŭ eldonita de la Komerco-Ĉambro de la departemento Meuse.

Ankaŭ dank'al li aperis en 1995 ĉe la Komerco-Ĉambro de COLMAR (Haut-Rhin) trilingva broŝuro prezentanta la liston de neokupitaj lokoj.

Al lia edzino kaj samideanino Liliane, kiu daŭre partoprenis kun li en niaj aranĝoj, ankaŭ aliregione kaj ĉe UK-oj ni direktas niajn plej sincerajn kondolencojn.



Edmond LUDWIG



## ESPERANTO FRANCE EST

### Raportoj de la grupoj de la regiono por 2021

#### BAR-LE-DUC Groupe des Espérantistes Meusiens

Pro malbonaj eventoj, la raporto ne povis esti farita.

#### MULHOUSE “Mulhouse-Espéranto”

Dua “lama” jaro kaŭze de la virus-pandemio!

- La tradicia “Trireĝa festo” planita la 12an de januaro estas nuligita.

- La Ĝenerala Membrokunveno okazis la 28an de junio en St-Louis (antaŭ la renkontiĝo “Verda Fadeno”).

- La “Verda Fadeno” okazis kvinfoje:

31an de majo, 28an de junio, 27an de septembro,

25an de oktobro, 29an de novembro aŭ en Rixheim aŭ en St-Louis.

- La tradicia informbudo en Ungersheim okazis la 20/21ajn de novembro.

- “Sud-Rejna-Kuriero” aperis dufoje (no-j 77 kaj 78).

Redaktita la 16an de januaro de Robert Kueny, sekretario

#### NANCY Esperanto Nancy 54

En 2021, kursoj daŭris, ĉiun merkredon, kiam la junuldomo Desforges ne estis fermita. Alvenis nova lernanto kaj entute ĝis 7 gesamideanoj progresis per “Stranga Malapero” aŭ okupiĝis pri ordigo de la biblioteko.

Gisèle Bertapelle daŭre riĉigis la retejon esperanto-nancy.fr.

Jean Luc helpis junajn gesamideanojn en traduko esperantlingven de videoludo “Samhain” <https://www.kongregate.com/games/JeuxBebel/samhain>.

Liliane Bersweiller organizis la 29an de aŭgusto promenadan tagon en Graufthal, kie oni povas vidi la rokdomojn de la “Blua Kato”, La loka radio “R.C N. (Radio Caraïbes Nancy 90,7 FM RCN-radio.org) malfermis kvarfoje siajn ondojn al nia grupo por unuhora prezento de Esperanto kaj tridek-minutaj kursetoj.

La 26an de junio, grupanoj kunprizorgis budon kun samideana fervojisto Christian Dardenne okaze de fervojista festo en Blainville-Damelevières,

Ekstere, grupanoj partoprenis la Zamenhof-Feston en Esch sur Alzette en Luksemburgio.

Same kiel en 2020 kaj en 2022, la grupo ne povis organizi la regionan staĝon en Art-Sur-Meurthe, pro la pandemio.

Kaj la pomarbo “esperanto” de Liliane donis siajn unuajn fruktojn, kiuj estis gustumataj dum merkreda kunveno!

### STRASBOURG

Kursoj por komencantoj okazis lunde en nia luita klasĉambro; 5 komencantoj ĉeestis ĝis junio 2020. Bedaŭrinde pro la pandemio la klasĉambro estis fermita, tamen tiam kursoj okazis preskaŭ ĉiusemajne marde kaj ĵaŭde vespere per Jitsi. Ni uzas la libretojn de Esperanto-France “Metodo11” kaj “Metodo12”.

La kulturaj vesperoj okazis nur per interreto. Ili okazis ĉiumonate ĝis majo 2021. Ni ludis kaj babilis pri diversaj temoj. Partoprenis ĉiufoje ĉirkaŭ dek-du klubanoj.

Ni piknikis du fojojn en la parko “Jardin des deux Rives” “Ĝardeno de ambaŭ riverbordoj”, sur la franca flanko vespere, sabaton la 26an de junio, kaj sur la germana flanko tagmeze, sabaton la 28an de aŭgusto. Ni estis ambaŭ-fojojn preskaŭ 20 partoprenantoj francaj, germanaj, usona, kaj eĉ rusa. Tre agrabla etoso, ni kune trinkis, manĝis, babilis, ludis. Por kelkaj Duolingo-esperantistoj estis bona okazo renkonti esperantistajn vivantojn.

La klubo havis budon en la strasburga foiro de asocioj “Village des Associations” en la parko “Parc de la Citadelle” sabaton kaj dimanĉon 18-19ajn de septembro. Sep klubanoj deĵoris kaj renkontis komencontojn, komencintojn (per

Duolingo) kaj disdonis esperantajn kalendarojn. Kelkaj libroj estis venditaj. Tio estis bona okazo diskonigi Esperanton kaj la klubon. La ĝenerala kunsido okazis en “Social Bar” en Strasburgo, la 23-an de septembro. Tiam ni akceptis la organizon de ĝenerala membrokunveno de Esperanto-France kaj Germana Esperanto-Kongreso en 2024 en Strasburgo. Ni ankaŭ planis organizi tagon por informi pri Esperanto en la “Maison des Associations”, la 21a de majo 2022. Ni ankaŭ decidis retkunsidi kun anoj de la nova esperanta klubo de Tübingen.

Post prezentado en “Village des Associations” en Strasburgo kaj informado pri esperanto la 20an de septembro en Illkirch, venis 5 novaj komencantoj al la kursoj, kiuj okazas denove ĉiun lundon en nia klasĉambro en Illkirch.

Ni denove ĉiumonate organizis ekde oktobro 2021 interretajn monatajn kulturajn vesperojn.

### T. A. K. E.

La cirkonstancoj de la ĵus pasinta jaro 2021 klare malebligis multajn niajn kutimajn agadojn. La devigo restadi hejme trafis multajn asociojn en siaj aktivecoj. Tial nia last-jara membro-kunveno okazis la 22an de novembro 2020 nur per skajo. En marto 2021 dank'al pluraj kontribuoj ni povis eldoni nian eldonajon:

Finfine en oktobro 2021 ni povis informi niajn membrojn per la oktobra cirkulero pri nia Ĝenerala Membro-kunveno.

**Renkontoj kaj kontaktoj**  
Pro manko de Universala Kongreso en Norda Irlando kaj de aliaj eventoj, ni havis malpli da eblecoj proponi nian eldonajon al partoprenantoj de tiaj eventoj. UK disvolviĝis sur la reto dank'al la klopodoj de a@i.

<https://vk.retevent.com/> Bone organizita, kiel pasint-jare, dum kio okazis ankaŭ la scienca kaj teknika



renkonto KAEST. Gratulojn al la  
gejunuloj, kiuj montris egan efikon!

### **KONSTRUADO-kajero 2021**

La revuo KONSTRUADO-kajero  
2021:

En 2021 ni sukcesis havigi al la  
revuo novajn kunlaborantojn el R.D.  
Kongo kaj el Brazilo. Tio estas  
rimarkinda rezulto (espereble  
daŭra!), ĉar ni ĉiam frontas la  
malfacilaĵojn por allogi novajn  
kunlaborantojn.

La ĉefa temo en 2021 estis AKVO.  
Jes, en la vivo kaj ankaŭ en la fakoj  
konstruado kaj arkitekturo la  
provizado je akvo estas nepre  
atentinda objekto. Tial, dank'al  
Allan Argolo, inĝeniero pri medi-  
protektado en Brazilo, aperis longa  
artikolo pri havigo de trinkebla akvo  
kaj pri teknikaj salubrigrimedoj. Ni  
povis ankaŭ respuguli la laboron de  
Asocio PIEADC en Konga urbo  
Kalima. De 2013 ĝis nun, iom post  
iome estis kreita tuta reto da akvo-  
tuboj por disdoni trinkeblan akvon  
al la tiea loĝantaro.

La rezulton oni atingis dank'al longa  
kaj serioza kunlaborado de afrikanoj  
de Goma kaj Kalima (ne ĉiuj  
esperantistoj) kaj de la asocio AVE  
(Asocio de vedulaj esperantistoj),  
precipe el Germanio, kiuj serĉis  
financajn apogojn. Tiu agado,  
prizorgata de Manfred Westermayer  
estas plu apoginda:

Ne surprizas onin, ke la temo  
“arkitekturo” multe ĉeestas en nia  
revuo, flanke de teknikaj temoj.  
Fakte, konstruado sen arkitektoj ne  
eblas! Ambaŭ fakoj estas streĉe  
ligataj!

Tial ni devas ankaŭ substreki la  
gravan laboron de nia kunlaboranto  
Claude Bensimon, eks-arkitekto, kiu  
provizis nian revuon per serio da  
artikoloj (2018; 2020; 2021) vere  
konservindaj! En tiu lasta eldono  
(2021) li provizis la legantojn inter  
aliaj temoj per tabelo dupaĝa kun  
arkitektaj terminoj (en la franca kaj  
en Esperanto). Estus bone, se  
esperantistoj volus kompletigi tian  
laboron per vortoj el siaj propraj  
lingvoj. Ni dankas vin pro via  
atento! Pierre Grollemund sekretario  
de TAKE

### **THONVILLE**

Agadraporto de septembro 2020 ĝis  
aŭgusto 2021

Monataj kunvenoj ĉe la domo de la  
asocioj Raymond Queneau en  
Thionville:

Ok sabataj renkontiĝoj inter la 14a  
kaj la 15a30 okazis video-telefone  
pro la pandemio kaj du pliaj okazis  
fizike en novembro 2020 kaj januaro  
2021 kun Bruno Henry, kiu revenis  
de Ĉinio en la pasinta vintro. Kiam  
Bruno estas en Ĉinio, li parolas al ni  
pri la ĉiutaga vivo kaj liaj  
esperantistaj agadoj en ĉi tiu lando.  
Dum la kunvenoj estis donitaj  
informoj pri la venontaj internaciaj  
kaj regionaj aranĝoj: la Universala  
Esperanto-Kongreso en Belfasto  
Norda Irlando, la kongreso de  
Sennacieca Asocio Tutmonda SAT  
en Bjalistoko en Pollando, kaj  
diversaj Esperanto-renkontiĝoj.

Ni praktikas Esperanton en niaj  
konversacioj parolante pri diversaj  
temoj. Ni memorigis pri Eŭgeno de  
Zilah, kiu malaperis la 02/10/2020.  
Li estis la kreinto de la Esperanto-  
klubo de Metz kaj verkis plurajn  
interesajn librojn: “Vivi en Barko”;  
“Kaj kiu pravas”; kaj “La princo ĉe  
la Hunoj”. Ankaŭ Eŭgeno de Zilah  
eldonis proprakoste dum 20 jaroj la  
revuon “La Gazeto”. Bernard  
rakontas al ni pri geneologio kaj la  
esploroj, kiujn li faras pri la historio  
de sia familio. Catherine rakontas,  
ke ŝi helpas la Kulturdomon de  
Esperanto Grésillon Baugé-en-  
Anjou por allogi novajn turistajn  
grupojn, familiajn kunvenojn kaj  
seminariojn.

Esperanto-kurso:

Komencantoj kaj praktikantoj en  
Thionville:

Pro la pandemio bedaŭrinde la  
kursoj ne okazis.

Prelegoj:

Pro la pandemio ni ne povis organizi  
prelegojn de eksterlandaj Esperanto-  
parolantoj.

#### **Zamenhofa Festo:**

Ni planis organizi ĝin kune kun niaj  
amikoj de la Luksemburga  
Esperanto-Asocio, sed la restoracioj  
estis fermitaj pro la pandemio.

Nia partopreno en diversaj  
kongresoj kaj vojaĝoj:

La sezono 2020/2021 estis profunde  
markita pro la sanaj problemoj  
kaŭzita de la Kovim 19-pandemio  
kaj pro tio la esperantistaj  
organizaĵoj nuligis multajn fizikajn  
eventojn kaj anstataŭigis ilin per  
virtualaj kongresoj kun riĉaj  
programoj de prelegoj, debatoj kaj  
spektakloj. Tiuj kulturaj eventoj  
kunvenigis centojn da Esperanto-  
parolantoj el la tuta mondo. Kelkaj  
el ni partoprenis en la virtuala  
kongreso de Universala Esperanto-  
Asocio UEA, la kongreso de la  
Internacia Fervojista Esperanto-  
Federacio IFEF kaj la kongreso de  
Sennacieca Asocio Tutmonda SAT,  
la kongreso de SAT-Amikaro kaj la  
ĝenerala kunveno de la Kulturdomo  
de Esperanto Grésillon en Baugé en-  
Anjou.

Bernard kontribuis al la disvolviĝo  
de la programo Duolingo por lerni  
Esperanton per saĝaj poŝ-telefonoj  
laborante en teamo pri la franca  
versio al la cellingvo Esperanto  
<https://www.duolingo.com/learn>  
Projektoj 2021/2022 prezentitaj en  
Esperanto de Bruno Henry:

#### **Monataj kunvenoj:**

Ili okazos unufoje monate ĉiu-sabate  
de la 14a ĝis la 16a ekde 09/10/2021  
per video-konferenco aŭ ĉe la  
Maison Queneau en Thionville. La  
celo estas praktiki Esperanton, lerni  
pli kaj prepari sin por novaj agadoj.  
Zamenhof-Festo Decembro 2021:  
Kontakto estos farita kun la asocio  
'Luksemburga Esperanto-Asocio' por  
organizi ĝin kune en Luksemburgio.  
Kulturaj kaj muzikaj vesperoj:  
Ni vidos laŭ la proponoj, kio okazos  
pri la preleg-turneoj organizotaj de  
Esperanto-France.

Esperanto-budo:

Sugestoj laŭ la ebloj.

Ekskurso por praktiki Esperanton:  
Bruno elvokas la eblajn elirojn.

Ankaŭ vidu por estontaj kunvenoj.  
Rimarku, ke nia asocio ankaŭ povas  
finance partopreni ĉi tiujn  
ekskursojn. Bruno kontaktos  
Catherine, ĉu ŝi povus proponi al ni  
gvidatan viziton de turisma loko.  
Staĝoj kaj seminarioj en Francio kaj  
eksterlando:

Bruno HENRY 2022/02/28

## Estrar-raporto 2021 de Esperanto France-Est

Pro la kronvira pandemio la agado de Esperanto France-Est estis draste reduktita por la dua sinsekva jaro.

Tamen, pro redukto de la kontaktoj, la prezidanto organizis Ĝeneralan Membro-Kunvenon en 68140 STOSSWIHR, sed nur en septembro.

Denove ne povis okazi la antaŭvidita regiona staĝo en Art-sur-Meurthe. La grupo de Nancy restis en kontakto kun la staĝejo.

En 2021 la membraro bedaŭrinde malkreskis. Tamen: abonas nun nian koloran bultenon LA INFORMILO niaj samideanoj de Bazelo.

André GROSSMANN daŭre kasistis kaj pluzorgis pri la ret-paĝaro de EFE

<http://esperanto.france.est.free.fr>:

Li ankaŭ fidele pluzorgis la engaĝigon kaj eldonadon de la ĉiutrimestra bulteno LA INFORMILO.

Jean-Luc THIBIAS daŭre okupiĝis sukcese pri la

riĉ-enhava LIBROSERVO alirebla en la sama retpaĝaro de EFE. Nur 2 lokaj aranĝoj invitis la libroservon: Ĝenerala Membro-Kunveno kaj renkontiĝo en Luksemburgo, kio iom kreskigis la vendojn: la librojn, la aĉetantoj ŝatas malkovri sur vendotablo kaj trafoliumi. Suma jara vendo: 700€.

Okaze de tiu membro-kunveno okazis eta ŝanĝo en la estraro: Jean-Luc THIBIAS transprenis la postenon de sekretario de EFE.

Jen la estraro de EFE tiam elektita:

Prezidanto: Edmond LUDWIG

Sekretario: Jean-Luc THIBIAS

Kasisto: André GROSSMANN

Libroservo: Jean-Luc THIBIAS

Retejoj kaj dissendo-listoj: André GROSSMANN

La prezidanto  
Edmond LUDWIG

La sekretario  
Jean-Luc THIBIAS

### Unesko-Kuriero en Esperanto

Eblas elŝuti Unesko-Kurieron en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. Jen kelkaj adresoj: Unesko-Kuriero (oktobro-decembro 2020) temas pri "50-jariĝo de la lukto kontraŭ ŝakrado de kulturaĵoj".

Ĉi tiu eldono estas senpage elŝutebla ĉe la retejo de Unesko:

[https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000374570\\_epo](https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000374570_epo)

Publikis la 4-a numero de UNESKO-Kuriero, 2021 pri "Rakontoj de migradoj".

Jen la ligilo por senpage elŝuti la kvaran de 2021 kaj aliajn :

[http://espero.chinareports.org.cn/node\\_7184254.htm](http://espero.chinareports.org.cn/node_7184254.htm)

Por elŝuti aliajn numerojn de Unesko-Kuriero, vi povas ankaŭ provi ĉi tie :

[https://uea.org/revuoj/unesco\\_kuriero](https://uea.org/revuoj/unesco_kuriero)

Bernard Behra



Kies Aŭto??



Ĉe Michel Basso flirtas la Esperanto-flago

Fotita en Saint Raphaël





# El nia libroservo

## Informoj



⇒ Ni rezignis pri la semaj-fino en Art Sur meurthe la 1/3ajn de aprilo. Sed eblos trovi la librojn alvenintajn dum la du pasintaj jaroj, en la Maison de l'Asnée en Villers les Nancy, okaze de la ĝenerala membrokunveno, la 15an de majo 2022. Tiu kiu deziras vidi (sen devigo aĉeti) libron aperantan en la katalogo informu min: mi alportos ĝin al la kunvenejo!  
Informoj aperos en la retejo [esperanto.france.est.free.fr](http://esperanto.france.est.free.fr)

Ĝis baldaŭ

Jean-Luc Thibias

[libroservo.efe@laposte.net](mailto:libroservo.efe@laposte.net)

## Nove alveninta libro



①



②




③



④



⑤



⑥

- 1. Desegnita humuro 2**, Humuraj desegnaĵoj, **Pavel Rak**, *Kava Pech.*, 2021, 120 p. 7,50 €. Elekto el la verko de konata humoristo, karikaturisto kaj ilustristo (komento el la retejo de Kava Pech), Humuraj desegnoj kun tekstoj en la ĉeĥa, kaj traduko en la angla, la germana kaj Esperanto.
- 2. Perrefleksa terapio kiel memhelpo**, scienco, **Radka Dvořáková**, *Kava Pech*, 2021, 72 p. 12,90 €. Memserva kurac-metodo: Kion tuŝi, kiam io doloras (komento el la retejo de Kava Pech).
- 3. Kosmofabeloj**, Fabeloj, **Gabriela Kopcová**, *Kava Pech*, 2020, 100 p. 12 €. Rakontoj pri fabelaj planedoj kaj iliaj enloĝantoj (komento el la retejo de Kava Pech).
- 4. La malgranda fantomo**, Fabela rakonto, **Otfried Preußler**, *Kava Pech*, 2021, 120 p. 9 €. Klasikaĵo de germana porinfana literaturo rekomendinda por ĉiu aĝo (komento el la retejo de Kava Pech).
- 5. Tri knaboj, Krepuskulino kaj Torurulo**, Fabelaĵo, **Pavel Rak**, *Kava Pech*, 2020, 12 p. 6 €. Libertempa aventuro de tri amikoj (komento el la retejo de Kava Pech).
- 6. Ĉinio, Koreio, Japanio**, Geografio, **Petro Chrdle**, *Kava Pech*, 2022, 248 p. 24 €. Impresoj el tiuj landoj, kiujn la aŭtoro ripete vizitis (komento el la retejo de Kava Pech).

### Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
  - perpoŝte al: Libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
  - per ret-poŝto al "[libroservo.efe@laposte.net](mailto:libroservo.efe@laposte.net)" - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54
- Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
  - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
  - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
  - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

Mendilo		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En		Subskribo:
la		

## Rakontoj

"Aŭskultu, bon-amik'! Ne estu ni azenoj,  
Dum leciona paŭz' proponon havas mi:  
Por la kaŝtan-rikolt' mi iru al ĝardeno."

"Ne, Fedja, tiu manĝ' ne estas nun al ni,  
Tro alta estas arbo.

Ne povas ni alrampi ĝis la frukt'  
Kaj tute fremdas nin alloga manĝ-produkt'!"  
"Ne timu, kamarad'! Plej helpos nin konjekto!  
Ja kie mankas fort', necesas intelekto.  
Elpensis ĉion mi laŭ saĝa bon-aranĝ':  
Vi helpu min alrampi nur al branĉ',  
Atingos mi la fruktojn lerte,  
Kaŝtanojn manĝos ni ĝissate, certe."  
Jen ili al ĝarden' ekkuris kun rapid',  
Kaj Senja al amik', al Fedja helpis multe,  
Por grimpu kamarad'al arbo bon-rezulte,  
Ne vana estis help' kun granda pen' kaj ŝvit.  
Al supro venis jam la knabo en sukceso.  
Kaŝtanoj en abund'. Mirindas la impresoj!  
Verdire estis ĝi riĉaĵo, kaj senfin'!  
Ĉu eblas nun kalkuli ĝin!  
La knabo havas multon por profito,  
Eĉ por donac' amika laŭ merito, —  
Kaj Senja sur la ter'rigardas kun manĝem',  
Sed estas de rigard' mizera nur efiko,



Ĉar Fedja manĝas fruktojn mem  
Kaj ĵetas de la arb' nur ŝelojn al amiko.  
Lertulojn vidis mi en viv'  
Por kiuj bon-amikoj kun naiv'  
Al supro rampi helpis kun fervoro,  
Sed poste ŝelo eĉ ne falis de sinjoro.

Verkis Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio  
tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)  
Ukrainio



## Feliĉe kaj kontente

Fabeloj en la okcidenta tradicio ofte finiĝas per geedziĝo inter princo kaj princino, aŭ foje inter princo kaj filino de muelisto, aŭ princino kaj aventurema junulo. Ĉiam tiuj fabeloj finiĝas per tradicia frazo de la speco "Ili pluvis feliĉe por ĉiam" aŭ simile. Lastatempe mi serĉis manieron por diri tiun esprimon en Esperanto. Zamenhof tradukis la fabelojn de Hans Christian Andersen, sed tiuj ne finiĝas per simila frazo kaj fakte ili ne nepre finiĝas feliĉe. La fabeloj de Grimm estis tradukitaj de la fama esperantisto Kabe, kaj en tiuj tradukoj troviĝas jenaj frazoj:

". . . nenio mankis en ilia feliĉo ĝis la morto." [La ora birdo]

". . . kaj vivis feliĉe ĝis la morto." [Sesope oni trairas la tutan mondon]

". . . kaj ili ĝoje vivis kune." [Haĉjo kaj Grenjo]

". . . ili ĉiuj vivis feliĉaj ĝis la fino." [Fidela Johano].

Tiuj esprimoj ne estis elpensitaj de Kabe mem, sed estas tradukitaj el la germana. (Mi dankas al Lenio Marobin el Brazilo pro tiuj ekzemploj.)

Mi petis informojn ankaŭ ĉe la Lingva Konsultejo en Fejsbuko, kie pluraj esperantistoj donis al mi la subajn frazojn el diversaj lingvoj. Ni ne voĉlegos la tutan liston, ĉar vi povos mem legi ĝin.

En la angla: Kaj ili vivis feliĉe por ĉiam poste.

En la finna: Kaj ili vivis feliĉe por ĉiam.

En la franca: Ili vivis feliĉe kaj havis multajn gefilojn.

En la germana: Kaj se ili ne mortis, ili ankoraŭ vivas hodiaŭ.

En la greka: Kaj ili vivis bone, kaj ni pli bone.

En la hispana: Kaj ili vivis feliĉe kaj manĝis perdrikojn.

En la hungara: Ili vivis en feliĉo, ĝis ili mortis.

En la itala: Ili vivis feliĉaj kaj kontentaj.

En la japana: Kaj onidire ili vivis senfine (t.e. longe) kaj feliĉe.

En la litova, pola kaj serba: Kaj ili vivis longe kaj feliĉe.

En la portugala: Kaj ili vivis feliĉaj por ĉiam.

En la rusa: Ili vivis feliĉe por ĉiam kaj mortis en la sama tago.

En la sveda: Kaj poste ili vivis feliĉaj en ĉiuj siaj tagoj.

En la turka: Ili atingis sian esperon, nun ni enlitiĝu.



Cetere, kelkaj legantoj de ĉi tiu artikolo verŝajne demandis sin, kial oni uzas foje la adverban formon "feliĉe", foje la adjektivan formon "feliĉaj". La adverbo kun -e rilatas al la verbo "vivis", kaj priskribas kiel la paro vivis. La adjektivo kun -aj rilatas al la paro mem, kaj priskribas ilin. Do, kiun esprimon uzi en Esperanto? Ne ekzistas unu fiksita frazo, kiel oni trovas en aliaj lingvoj. Tial, kiam mi mem bezonis tiun frazon, mi decidis uzi la esprimon: "Ili pluivivis feliĉe kaj kontente".

Anna Lowenstein (kun danko al ĉiuj kontribuintoj)

## Sovaĝaj olivarboj en Cluj / Kolozsvk; traduko de Lenke Szisz el Hungario

La olivarbo ne estas planto, kiu kreskas sovaĝe en Rumanio. Ordinara turisto vidas olivarbon en Grekio, en Turkio aŭ en aliaj mediteranaj landoj.

Estas nekutime renkonti sovaĝajn olivarbojn en la transilvania grandurbo, Cluj. La mistero estis solvita de specialistino en historio de la Otomana Imperio, Margareta Rachita Aslan:

En la pluva printempo de la jaro 1603, turka armeo konsistinta el ĉirkaŭ 10.000 soldatoj postenis ekster la muroj de la urbo. Ilia komandanto estis Bektaŝ paŝa. El kroniko estas sciata, ke dum la unuaj tagoj de ilia alveno pluvegis abunde. Soldatoj de



la otomana armeo kunportis en saketoj diversajn kurac-herbojn kaj fruktojn konservitajn per sekigo.

La sekigitaj fruktoj de olivarbo estis bonegaj kuraciloj kontraŭ malvarmumo, diareo kaj aliaj malsanoj oftaj dum la militaj kampanjoj. La fruktoj enhavantaj vitaminojn, mineralojn fortigis la imunosistemon, kuracadis malsanojn. La semoj de la fruktoj manĝitaj estis disjetitaj, kaj en la tero, pro la pluvego malsekigita, ili ĝermis kaj dum jaroj kreskis en tiu loko sovaĝaj olivarboj. Poste, dum jarcentoj, la arboj plimultiĝis el la falintaj fruktoj. Jen la mistero de la sovaĝaj olivarboj en Cluj solvita.

NIGRA KVADRATO (fabelo)-

En subteretaĝo vivas kato. De tempo al tempo mi donis al ĝi fiŝon. Iu-foje mi decidis klerigi tiun beston. Mi demandis ĝin:

"Kion vi pensas pri "Nigra kvadrato" de Maleviĉ

- Ĝi demandis min: "Ĉu tio estas viando?"

-Ne, tio estas artaĵo!

-Ho, bone. Tiam vi mem manĝu vian "Nigran kvadraton", sed al mi donu blankan kvadraton de lardo kaj ruĝan kvadraton de kolbaso.

-Ho, ve! Mi rakontas al la kato pri arto, sed ĝi pensas nur pri lardo kaj kolbaso. Tiu kato estas malklera, vulgara, sed ĝi ne solas. En mondo estas aliaj katoj. Ĉe mia pordo mi renkontis ruĝan katon Suneto. Mi

demandis ĝin:

"Kion vi pensas pri "Nigrakvadrato" de Maleviĉ?"

- Vi eraras! Per la kapo mi ne pensas, per la kapo mi manĝas.

Mi kuris al la hejmo. Tie mi prenis fiŝon kaj donis ĝin al la kato. La kato formanĝis tiun fiŝon. Poste sidante sur benko kaj ĝuan la sunon ĝi aŭskultis prelegon "Nigrakvadrato" de Maleviĉ. Pasis semajno. En najbara korto vivas blanka kato Neĝero. Matene ĝi kuras al mia hejmo. Ĝin haltigas hundo Trezoro:

Neĝero, kien vi kuras?

Mi kuras al prelego "Nigra kvadrato" de Makevuĉ

-Ĉu tiu prelego estas interesa?

-Tiu prelego estas enuiga, sed ĝi tre bongustas.

INTERNACIA LITERATURA ESPERANTA KONKURSO "HRISTO GOROV-HRIMA" — 2022

Hristo Gorov — Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj. La konkurso estos por rakonto kaj eseo. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La

konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu

tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj ret-adreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman-12 punktaj La gajnintoj ricevos valorajn premiojn. Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 31-a de oktobro 2022 al adreso: e-mail: modest@abv.bg aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio — 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario

## ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2022 ĝis 2024

La abon-periodo 2021 jam finiĝis per la lasta numero 196. Ĉi-tiu numero 197 jam estas la unua de la jaro 2022. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 198 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2022.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE ktp.) kaj eventuale pago por la sekvantaj jaroj 2023 - 2024

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "*Via abono estas finita, ni petas reabonon*", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2021. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo. Vi trovos aldonitan abonilon je via nomo kaj koverton.

Krome nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevitaĵoj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de viaj impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

		Jaroj:	2022	2023	2024
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	19 eŭroj	20 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
<b>UEA 2022</b>	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon <b>Esperanto papere</b>			74 eŭroj
Pag- manieroj	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2022 por 1208				
	<b>2. Per franca bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2022, 2023				
	<b>3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est</b> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				

### Etaj rakontoj pri la katedralo de Strasburgo

Antaŭ iom da jaroj s-ino Sûzel Pailhès verkis libron pri la katedralo de Strasburgo. Ĝi estis eldonita en 12 lingvoj. Ĉiu libro aperis en 3 lingvoj. La Esperanto-versio aperis kun la hispana kaj la rusa.

En januaro la presejo Rugé en Mulhouse fermis. Pro tio multaj libroj estas nun senpage haveblaj. Nia Asocio ricevis pli ol 100 librojn de la Esperanto-versio.

Ni povas proponi ilin al vi kun pago de la sendkostoj, laŭ ĉi-suba tarifo. Okaze de via abon-pago vi povas sam-okaze mendi ĉe nia kasisto.

		Francio	Eŭropa Unio	Mondo
<b>1 libro</b>	500 gr	6,00 €	1,49 €	2,60 €
<b>2 libroj</b>	1 kg	7,50 €	2,87 €	5,03 €
<b>3 aŭ 4 libroj</b>	2 Kg	10,50 €	3,86 €	6,88 €





Karaj gesamideanoj,  
Tutkore Ni invitas vin al partopreno en tradicia AMIKA TAGO. Ĝi okazos egal-distance inter Colmar kaj Strasburgo, nome en

Sélestat-Schlettstadt  
sabate la 2-an de julio 2022

Ni rendevuu je la **10a-15** antaŭ la stacidomo.  
Alvenantojn per trajnajn ni veturigos aŭtomobile al la centro.

**Pro nestabila situacio koncerne la pandemion kaj la eble diversaj sanprotektaj postuloj, ni proponas, ke ni kune pikniku.**

## AMIKA TAGO

Programo:

**Vizito al la urbo**

**Vizito al la Domo de la pano (pluretaĝa historio de panfarado) 5 €**

**Pikniko**

**Vizito al la renovigita humanisma biblioteko Beatus Rhenanus. 6 €**

+Ĝis baldaŭ!

E.L.

## Grejzono

Elektu disponeblan periodon.

Maison Culturelle de l'Espéranto  
château de Grésillon  
F-49150 Baugé en Anjou

**KURSARO/stage  
PRINTEMPAS**  
22 - 30 avril 2022

Marion Quenut  
kurso/cours  
A1 A2

Christophe Chazarein  
kurso/cours  
B1

Sabi Szabolcs  
kurso/cours  
B2

Pšemek Wierzbowski  
kurso/cours  
C1

Vidu/voir gresillon.org/p

2022-mar-31/apr-05: Verden AMO FFEA (4-5 noktoj)  
2022-apr-22/30: PRINTEMPaS (7-8 tagoj)  
2022-apr-29/30: nur KER-ekzameno (1-2 tagoj)  
2022-mar-31/apr-05: Verden AMO FFEA (4-5 noktoj)  
2022-apr-22/30: PRINTEMPaS (7-8 tagoj)  
2022-apr-29/30: nur KER-ekzameno (1-2 tagoj)  
2022-maj-04/09: Ĥoro Interkant (5 tagoj)  
2022-maj-09/13: Aŭtografita sesio kaj verkada ateliero (4 tagoj)  
2022-jul-04/08: Verda Naturisma Semajno (4-5 noktoj)  
2022-jul-11/21: Maratona Esperanto-kurso, IEK (10 noktoj)  
2022-jul-25/aŭg-04: Interŝanĝoj reciprokaj de scioj (7-10 noktoj)  
2022-aŭg-16/25 : Semajno por infanoj, familioj (7-10 noktoj)

Kalendaro 2022 sur unu paĝo  
Aŭtoro : Umberto Bortolossi



TAGOJ					AUG	FEB	JUN	SEP	APR	JAN	MAJ
						MAR		DEC	JUL	OKT	
						NOV					
1	8	15	22	29	LUN	MAR	MER	JAŬ	VEN	SAB	DIM
2	9	16	23	30	MAR	MER	JAŬ	VEN	SAB	DIM	LUN
3	10	17	24	31	MER	JAŬ	VEN	SAB	DIM	LUN	MAR
4	11	18	25		JAŬ	VEN	SAB	DIM	LUN	MAR	MER
5	12	19	26		VEN	SAB	DIM	LUN	MAR	MER	JAŬ
6	13	20	27		SAB	DIM	LUN	MAR	MER	JAŬ	VEN
7	14	21	28		DIM	LUN	MAR	MER	JAŬ	VEN	SAB

## Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2						■				
3		■								
4									■	
5					■			■		
6		■								
7						■				■
8					■					
9				■						
10						■				

Jen moderna generacio de geavoj. G.J.

La respondilo de telefon-aparato jene atentigas:

*“Saluton, ni momente ne estas hejme, bonvolu lasi mesaĝon post la signalo. Se vi estas unu el niaj gefiloj, **tajpu 1** Se vi deziras, ke ni vartu la infanojn, **tajpu 2** Se vi bezonas helpon por gladi aŭ lavi tolaĵojn, **tajpu 3***

*Se vi deziras, ke la infanoj dormu hejme, **tajpu 4** Se avinjo preparu kukojn por venonta dimanĉo, **tajpu 5***

*Se vi bezonas monon tajpu # kaj elŝaltu Se vi estas unu el niaj geamikoj, bonvolu nun paroli... Saluton!”*

Turisto en al dezerto tute perdiĝis kaj ege soifas.

Li vidas beduenon en lia eta butikio.

*“Mi ege soifas, bonvolu vendi al mi akvon!*

*- Mi vere bedaŭras, sed mi vendas nur kravatojn...”*

Aliaj vendistoj survoje same respondis al li, ke ili vendas ĉefe kravatojn, sed ne akvon.

Finfine, ĉe la horizonto li rimarkas grandan hotelon en oazo.

Li deziras eniri, sed la pedelo malhepas lin, dirante:

*“Estimata sinjoro, mi petas pardonon, sed en ĉi-tiun hotelon rajtas eniri nur gastoj kun kravato!”*

La kirurgo aŭskultumas sian pacienton kaj informas lin:

*“Bone, morgaŭ mi operacios, sed tia operacio estas komplika kaj multekosta, tial mi ŝatus scii, ĉu via vidvino kapablos pagi la fakturon!”*

### HORIZONTALALE

1. Laŭda aŭ flata esprim’.
2. Ina organ’. Ag’ de iu, kiu moviĝas eksteren.
3. Esprimante neadon.
4. Sal’ de acido, uzata kiel en kuirarto kiel gustofortigilo.
5. Ĉefurb’ de Dominiko. Finaĵo de preterito. Konceda partikulo.
6. Vira antaŭnom’.
7. Foliarba arbustar’ de la Mediteranea regiono. Centro de Parmo.
8. Inversa kapo de tirano. An’ de antikva popolo de Meksiko.
9. INVERSE: stat’ de kvieto aŭ trankvilo. Postaja poŝo de la birdoj.
10. INV:prezenti ion per strekoj kaj koloroj. Insulo sen vokaloj.

### VERTIKALE

1. Religia societ’ el pastroj aŭ monaĥoj .
2. Zigot’. Litera nomo. INV:malofta.
3. Manskribaj’.
4. Verba temp’, montranta senprecize la estintecon.
5. Rilata al fksado per ŝnuro. Sufikso. Nov-zelanda papag’.
6. Havis koran inklinon. Alta mont’.
7. Kreskaĵo de maligna tumor.
8. Ar’ de eminentaj homoj. INV:alkala blanka metal’.
9. INV:alkohola trinkaĵ’. INV:prezertantaj simpligatan figuraĵon.
10. Aparat’ por bori aperturon en kranio. Part’ de korpo.

Dum staĝo en iu kazerno, junulo ricevas pafilon kun klarigoj.

*“Vi iĝas gardisto ĉi-tie. Se iu alproksimiĝas vi krias: “**Kiu estas vi?**” ”*

*Se li tute ne respondas, tiam vi krias “**haltu tuj!**”...*

*Se daŭras la silento, vi pafu!”*

Iom pli poste, la juna staĝano aŭdas paŝojn...

Li ekrias:

*“**Kiu estas vi?**” kaj “**Haltu tuj!**”...*

Tiam aŭdiĝas laŭta timoplana voĉo..

*“Ne pafu, stultulo! mi alportas al vi kartoĉojn!”*

### **SOLVO KVE 196:**

#### **HORIZONTALALE:**

- 1.DIPENSARI. 2.ENCEFAL. BO. 3.ITERACI. 4. LIN. KUL. LI. 5.ASTAT. OLDA. 6.GLIM. AMEL. 7.RAL. MK. GIS. 8.AMUZIST. BT. 9.CO. OTERB. 10.. DORLOTAD.

#### **VERTIKALE:**

- 1.DEFLAGRACI. 2.IN. ISLAMO. 3.SCINTILU. 4. PET. AM. ZOO. 5.EFEKT. MITR. 6.NARU. AKSEL. 7.SLALOM. TRO. 8.LEG. BT. 9.RBILDLIB. 10.IO. IA. STUD.



## Humuraĵoj per limerikoj

Ĉerpitaj el la libro de Hannes Larsson "700 Limerikoj".

Limeriko estas kvinversa poemo. La versoj 1, 2 kaj 5 rimiĝas kaj havas jenan ritmon ti-ti-taa-ti-ti-taa-ti-ti-taa-ti. La versoj 3 kaj 4 rimiĝas kaj havas la jenan ritmon: ti-ti-taa-ti-ti-taa-ti

**Rodanalpaj loĝantoj friponas:**  
"esperanto perfekte ni konas".

Nu, se oni kontestas  
kaj pro tio protestas,  
ili n-on post esti aldonas.

**Asidua virino aliĝis al MES,**  
kaj tie ruĝiĝis

vidante ke multaj  
viroj ĉarmaj, ne stultaj  
en varma etoso kuniĝis.

**En plurlingva urbeto, Babelo**  
poliglotoj kuniĝis kun celo  
trovi lingvon komunan  
la plej oportunan.  
Jam videblis la fin' de l' tunelo.

**Se al vi nun la ĉeĥa nom' Chrdle**  
aperas tutneprononceble,  
esperant', lingvo nia  
(kaj la finna, eĉ ĝi, ja)  
fonemas, jes ja, kompreneble.

**Tre klera lernant' ĉe l' komenco**  
ne memoris nomojn de parencoj.

Nu, patro, patrino  
facila afero, sed kio  
pri nepo kaj nev', diferenco?

**Ofte venis tra la Balta Maro**  
en Sankt-Peterburgon lararo.

Tiuj birdoj kriantaj  
kaj ĉie fekantaj  
volis vidi palacon de l' caro.

**Al tenoro tre plaĉis la pasto,**  
iun tagon amik' laŭdis faston  
tuttagan, membriĝis  
al la kasto sed iĝis  
rekordulo kun kvarhora fasto.

**Eldonis konsilojn ordeno**  
de la ludistoj de orgeno  
malinfektu klavaron,  
antaŭ l' aŭskultantaro  
instalu nesalteblan ĉenon.



**Kantistin' de muziko lirika**  
estis tiom nekredeble dika:  
de l' tenoro la brakoj  
ŝin ne povis sen krako  
ĉirkaŭi (amsceno klasika).

**De geedza sumoista festo**  
restas tiu valora atesto:  
post divido de torto  
laŭ pezo de korpo:  
la sesono al ŝi, al li... l' resto.



# Vortludo furoras ankaŭ en Esperanto

*La anglalingva vortludo Wordle ekfuroris en la reto en decembro 2021 kaj ĵus estis aĉetita de New York Times. Rapide aperis kopioj en aliaj lingvoj – en Esperanto almenaŭ du. Ni parolis kun la kreinto de unu el tiuj.*

*La reta, anglalingva vortludo Wordle estis publikigita de la usona programisto \_en oktobro 2021, kaj vaste populariĝis ekde decembro, kiam estis aldonita la eblo diskonigi la rezulton rete. Nun milionoj da homoj ludas ĝin ĉiutage, kaj afiŝoj pri rezultoj videblas ĉie en sociaj retejoj.*

*La ĉefa allogaĵo de la ludo estas, ke ĉiuj uzantoj ricevas la saman kradon en la sama tago, kaj povas kompari siajn rezultojn.*

*Kvankam la originala ludo estas anglalingva, rapide aperis tradukoj en dekoj da lingvoj, inkluzive de Esperanto. Libera Folio parolis kun Enric Pineda, la kreinto de Esperanto-versio.*

*Libera Folio: Kio estas Wordleo kaj kiel la ludo funkcias?*

**Enric Pineda:** – Wordleo estas simpla, senpaga ludo, kies celo estas diveni 5-literan vorton en ses provoj. La vorto por diveni ŝanĝiĝas ĉiutage, kaj oni povas diveni nur unu vorton dum unu ludo. La funkciado estas tre simpla: la ludanto skribas 5-literan vorton, kaj la ludo kolorigas la literojn kun 3 koloroj: grizo, se la litero ne ekzistas en la kaŝita vorto, oranĝa koloro se la litero ekzistas en alia pozicio, kaj verdo se la litero estas en la ĝusta pozicio.

## Kiuj estas la diferencoj inter Wordleo kaj la alia esperantlingva versio ?

– Eĉepte de la nomo aŭ la grafika fasado, la diferencoj ne estas multaj. Eble la koloroj kaj la interna funkciado de Wordleo similas pli al la originala ludo.

Wordleo akceptas nur bazajn formojn de vortoj, sed en Vortjo funkcias ankaŭ vortoj kun aliaj finaĵoj. Nun oni povus ludi en Esperanto, do per esperantaj vortoj. Estas mem du senpagaj eblecoj:

<https://vortjo.net/>


<https://esperanto.cat/wordleo/>

Ankaŭ vi provu por trovi 5-literan vorton en Esperanto


Jen ekzemplo de sukcesa rezulto post nur 4 provoj ĉe Wordleo

Jen ekzemplo de sukcesa rezulto post nur 3 provoj ĉe Vortjo.

WORDLEO



VORTJO





# Virtualaj kunvenoj kaj prelegoj de la

## Londona Esperanto-Klubo .



<https://www.youtube.com/channel/UCiN6RS-t5RDEKZy2ThCNnDg/videos> .


La Londona Esperanto-Klubo organizas ĉiu-vendrede vespere ekde la 20a horo (laŭ franca horo) virtualan kunvenon. Plej ofte kunlaboras la Antverpena Klubo.

Renato Corsetti regule informas interesatojn pri zoom-kodoj kaj pasvortoj.

La kunveno komenciĝas per prelego, kiu plej ofte daŭras proksimume unu horon. Post serio da demandoj kaj respondoj sekvas diskutoj kaj babiladoj.

La nombro da gastoj ofte superas 80 personojn, kiuj povas interveni por demandi aŭ komenti.

## Prelego de Amri Wandel pri la temo: Ĉu ekzistas vivo sur aliaj planedoj?



Ĉu ekzistas vivo sur aliaj planedoj?

Al tiu enkonduka demando Amri Wandel ne povis respondi.

Li unue montris bildon pri la spac-teleskopo Kepler, kiu funkciis inter la jaroj 2010 kaj 2016. Per kiu eblis malkovri planedojn ĉirkaŭ multaj sunoj, ĉefe ruĝaj nanoj.

Fakte, kie serĉi vivon ekster nia tero? Ĉu en nia propra sun-sistemo? Akvo estas ja la kondiĉo, por ke ekzistu vivo. En 2015 Nasa ja trovis spuron pri likva akvo sur marso, sed ne vivon. Marso estas ĉefe frosta dezerto. Likvan akvon ĝi trovis sur Eŭropo, satelito de Jupitero. Fakte sub tavolo da glacio troviĝas ege vasta oceano, sed oni ne scias, ĉu tie troviĝas vivo. La aliaj terecaj planedoj:

Merkuro, Venuso, ne havas vivon.

Alia ebleco trovi vivon krom sur la 8 planedoj de nia propra sun-sistemo, la spac-teleskopo Kepler malkovris 4000 ekster-planedojn. En la jaro 2018 la misio TESS trovas pliajn milojn da planedoj.

En la konata universo ekzistas ĉirkaŭ 100 miliardoj da galaksioj.

En nia galaksio, la Lakta Vojo, estas ĉirkaŭ 200 miliardoj da steloj kaj sun-sistemoj. Ĉiuj havas planedojn, ĉirkaŭ 20% havas planedojn similajn al la Tero.

Supozeble la tero estas ne unika. Ĉu nun estas imagebla, ke inter tiom da sunsistemoj kaj planedoj... vivo aperis nur sur unu planedo - la tero? Laŭ la kopernika principo tre verŝajne ne.


La tero ne estas unika. Nun la sciencistoj ne plu demandas ĉu vivo ekster-tera ekzistas, sed kiam kaj kie ni ĝin malkovros.

En nia propra sun-sistemo la terecaj planedoj: Merkuro, Venuso kaj Marso. Nur sur tiuj planedoj estas ŝanco trovi spuron de likva akvo de taŭga temperaturo de admosfero kaj de vivo.

Venuso estas tro varma pro tro densa admosfero, Marso estas frosta dezerto..

### Nia sun-sistemo

- **Terecaj planedoj:** Merkuro, Venuso, Tero, Marso
- **Gasaj gigantoj:** Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno
- **Etuloj:** nanaj planedoj, asteroidoj, kometoj, meteoroidoj



### La terecaj planedoj



# 2012- Curiosity

## 2018: organikaj molekuloj

En 1976 la spac-ŝipo Viking ne trovis vivo-signojn: metabolismon, bakteriojn.

En 2012 la veturilo "Curiosity" veturis sur Marso kaj en 2018 trovis simplajn organikajn molekulojn.

Sed en 2021 surmarsigis la plej moderna kaj plej potenca esplorilo kun la nomo "Perseverance". Ĝia celo trovi la ekziston de antikva vivo en Kratero Jezero (antikva lago)



Finfine el la tri terecaj planedoj nur la tero havas la taŭgan temperaturon, kiu ebligas likvan akvon por akcepti vivon.

Necesas kompari la distancojn inter planedoj de nia sun-sistemo kun foraj ekster-planedoj, similaj al Tero. (ekz. Marso) je 100 milionoj km. 8 monatoj en spac-ŝipo. Foraj planedoj en "najbaraj" sun-sistemoj troviĝas je 10 lum-jaroj 100.000.000.000.000 km aŭ 100.000 jaroj en spac-ŝipo. Nia galaksio, la lakta vojo, grandas je 100.000 lumjaroj. Tamen tie troviĝas 200 miliardoj sun-sistemoj.

### Kie ni serĉu vivon?

Marso

Europo (Jupitera luno)

Foraj ekster-planedoj, similaj al Tero

Vivo ekstera 2022 Wandel

Laŭ la kopernika principo, Amri Wandel opinias, ke ĉirkaŭ la jaro 2030 eblos respondi al la demando pri vivo ekster nia planedo.

Krome aperis nova scienco: Astro-biologio, serĉado de biologio kaj vivo en la spaco ekster-Tera.

Nova spac-teleskopo lanĉita en 2021 JWST esploras ekster-planedojn. Tiam ni havos unuafoje la

### La Kopernika principo kaj ekster-tera vivo

Tero ne estas speciala:

- ~1600: Ne la centro de la Sunsistemo **Koperniko**
- ~1800: Polvero en giganta galaksio **Herschel**
- 1925: Unu el multegaj galaksioj **Hubble**
- 2000: Ne la sola planeda sistemo
- 2015: Terecaj planedoj tre oftaj
- 2030?: Ne la sola planedo kun vivo?**

### Spac-teleskopo esploras eksterplanedojn

2010- 2015: spac-teleskopo **Kepler** malkovris ĉ. 4000 ekster-planedojn

2018: lanĉita **TESS**, sekvanto de Kepler

2021: lanĉita **JWST**, sekvanto de HST

Vivo ekstera 2022 Wandel

De Homoŝtato à tout le monde

et plein gravos

kapablon trovi spuroj de molekuloj. La 4 viv-signaloj estas: 1) Oksigeno sekve al foto-sintezo. Komence la Tero ne havis Oksigenon. 2) Akvo-vaporo en la admosfero, kiu povas indiki likvan akvon 3) Eblas analizi la spektron de la admosfero por trovi aliajn diversajn molekulojn 4) metano.



Ankaŭ gravas la grandeco de planedo kaj la distanco al sia

**200 miliardoj da steloj en la Lakta Vojo: Kiom da ili havas planedojn kun vivo?**



## Informoj pri TAKE

### Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.



Ni havas la plezuron informi vin, ke la fak-asocio TAKE ĵus sukcesis aperigi sian jaran revuon

#### "KONSTRUADO-kajero de TAKE 2022".

Ĉi-apude troviĝas la titoloj de la diversaj artikoloj de la ĉi-jara numero.

La ĉefa temo rilatas al "skafaldoj" sed ankaŭ pri izolado de domoj, per uzo de diversaj izoligaj materialoj, ekzemple per ŝaum-vitro kaj ankaŭ per forigo de termikaj pontoj.

Rilate al urbanismo aperas artikolo pri domo sen lifto kaj sen ŝuparo.



## ENHAVO

### Titolo

- 1 Enhavo
- 2 Enkonduko
- 3 Domo SEN ŝuparo
- 4 Drena betono
- 5 Dometoj el kanabo
- 6 Skafaldoj nepre sekureco
- 7 Skafaldoj el bambuo
- 8 Skafaldoj el ŝtalaj tuboj
- 9 Skafaldoj modernaj
- 10 Urbanismo
- 11 Karmenala preĝejo
- 12 Ŝaum-vitro
- 13 Izoligaj materialoj
- 14 Termikaj pontoj
- 15 Termik-pontaj bariloj
- 16 Konusa tegmento
- 17 Utilaj informoj

Ĉiuj membroj de TAKE ricevas la ĉi-jaran eldonaĵon **"KONSTRUADO-kajero de TAKE 2022"**, Laŭ la ĉi-subaj tarifoj eblas membriĝi al la fak-asocio TAKE kaj ricevi la ĉi-jaran broŝuron.

Ankaŭ eblas mendi antaŭajn numerojn de **"KONSTRUADO-kajero"** kaj de **"Jarkolektoj"**.


Nia redaktoro Pierre Grollemund volonte povas akcepti viajn proponojn aŭ eĉ viajn kontribuadojn por venontaj numeroj. Bonvolu tiam rilati kun li: [verdapigo@gmail.com](mailto:verdapigo@gmail.com)

La komitato de TAKE

KOTIZOJ AL TAKE	2022	2023	2024
Normala kotizo	9 eŭroj	9 eŭroj	9 eŭroj
Subtena kotizo	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
Ĉiuj membroj ricevos en 2021	La KONSTRUADO-kajeron TAKE (ampleksa teknika kajero)		
Eblas mendi antaŭajn numerojn por la jenaj jaroj: Mendo de 1 ekzemplero: 9 eŭroj	Konstruado-kajeroj 2021 2020 2019 2018 2017 2016 Jarkolektoj: 2015 2012 2011 2010 2009 2008 2007 2006		
Pago en Francio	Per ĝiro al TAKE: <b>Poŝt-banko:</b> CCP 2 549 46 A Strasbourg Per sendo de franca ĉeko en eŭroj je la nomo de TAKE-Esperanto, al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM Francio		
Pago Internacie	Internacia ĝiro al TAKE: IBAN: FR58 2004 1010 1502 5494 6A03 650 BIC: PSSTFRPPSTR		
Pago pere de UEA-konto	Per ĝiro al la UEA-konto de TAKE: ekat-i Bonvolu sam-okaze informi pri via pago al: <a href="mailto:andreo.ag18@sfr.fr">andreo.ag18@sfr.fr</a>		

## Artaĵoj de la valoj “Lonetal” kaj “Achtal”

En la proksimeco de Aalen estas du valoj “Lonetal” kaj “Achtal”. La kavernoj de tiuj du valoj estas agnoskitaj de la UNESKO-Komitato kiel mond-heredaĵo. Kompreneble ĉi-tie ni montras nur la fotojn de la tre gravaj kaj belaj artaĵoj.



En kelkaj kavernoj de la valo apud la urbo *Blaubeuren* (pra-Danuba-valo) kaj la valo “Lonetal” (valo de la rivero Lone) estis trovitaj la plej antikvaj figuraj artaĵoj de la homaro (inter 30.000 ĝis 40.000 da jaroj)

En la kavernoj de la valo Lonetal estis trovitaj multe da etaj figuroj el eburo (mamuta dento) kiel mamuto, ĉevalo, bizono kaj speciala figuro (duon-homo, duon-besto) konata kiel “Löwenmensch” (leona viro).

Löwenmensch (en la kaverno Hohlenstein, valo Lonetal, rekonstruita el 300 etaj pecoj), ĉirkaŭ 32 cm alta kaj eta figuro “Löwenmensch klein” (trovita en la kaverno en la valo Achtal) ĉirkaŭ 2,5 cm alta.



Intertempe la sciencistoj pensis, ke tiu figuroj montras iun ŝamanon (ĉar en Francujo sur la muro en la kaverno Les Trois Frères estas pentraĵo de ŝamano, duon-besto kaj duon-homo).



En la kaverno “Vogelherd-Höhle” Intertempe oni trovis multe da interesaj figuroj. La tre konata estas la “pra-ĉevalo” kaj la sen-makula mamuto.

En la kaverno de la valo “Achtal” estas trovita la eta figuro de la “leona viro”.



Flutoj el cigna-ostoj



Figuroj el eburo, ekzemple anaso



Virinaj figuroj nomataj Venuso

(Venus von Schelklingen, Venus vom Hohlefels)

La originalojn de tiu trovaĵoj oni povas spekti en la muzeoj “Ulmer Museum”, “Urgeschichtlichen Museum Blaubeuren” kaj en “Museum Alte Kulturen auf Schloss Hohen”.

## Adiaŭ, Nieuwe Binnenweg

de Redakcio je 2022-03-05 en vidpunkto (*Libera Folio*)

En la prestiĝa nederlanda ĵurnalo NRC sur videbla loko aperis artikolo de Marc van Oostendorp pri la vendo de la domo de UEA en Roterdamo. La nederlandlingva artikolo havis la Esperantan titolon “Adiaŭ, Nieuwe Binnenweg”, kaj finiĝis per la vorto “adiaŭ” en Esperanto. Kun permeso de la aŭtoro ni publikigas la tutan tekston en Esperanto.

*La Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo fermiĝas. Marc van Oostendorp rememoras pri sia varma ligo kun inventita lingvo en la praktiko.*

Dum sesdek ses jaroj ekzistis en Nederlando montrofenestro kie sensuspektaj preterpasantoj povis vidi ekzemplerojn de *Reĝo Lear* de William Shakespeare, de *La taglibro* de Anne Frank aŭ de *Asterikso la Gaŭlo*. Baldaŭ tio finiĝos. Definitive falis la kurteno por la centra oficejo de Universala Esperanto Asocio (UEA) en Nieuwe Binnenweg en Roterdamo.

Ekde sia fondo en 1908, UEA estis la plej granda Esperanto-organizaĵo en la mondo, kun la celo antaŭenigi la internacian lingvon proponitan en 1887 de la pola okulkuracisto Lejzer Zamenhof. La oficejo estis establita en Roterdamo en 1955, post sidejoj en Ĝenevo kaj Londono.

**Ĉe sia apogeo, Nieuwe Binnenweg** estis la fieraĵo de la movado: oficejo kie homoj el plej diversaj landoj kunlaboris Esperantlingve, unu el la malmultaj lokoj kie eblis atentigi kolegon en Esperanto ke la necesejo denove ŝtopiĝis. Ĝi estis la loko kie oni redaktis la vaste legatan monatan revuon *Esperanto*, organizis la internaciajn kongresojn, kaj kie do troviĝis ankaŭ librovendejeto, krom granda biblioteko.

Mi estis tie ofta vizitanto. Kiel juna knabo, enamiĝinta al la strebo plibeligi la mondon pere de lingvo. Kiel

studento, pensanta ke eblas ekscii plej multe pri lingvo tie kie inventita lingvo estas uzata en la praktiko. Kiel mezaĝa viro fleganta rilaton de amo-malamo kun la foje mirigaj idealistoj de la movado, sed neniam malliganta sin de tiu. Mi paŝis en la oficĉambron de la severa finna direktoro, vidis ludi la filinon de la hungara revu-redaktoro, sidis ĉe la kaftablo kaj ridis kun la bosniano Simo, la kroato Nikola, la rumano Ionel, la nederlanda Atie.

Eĉ ne estas evidente ke nun ekzistus malpli da Esperanto-parolantoj ol pasinteco. Aplikaĵoj kiel Duolingo logis centmilojn da homoj al la ideo lerni la lingvon. Nur ke tiuj homoj ne plu sentas sin allogataj al membreco en iu asocio. Krome la konstruaĵo iĝas ĉiam pli multekosta – ekzemple, necesus signifa investo por plenumi la postulojn de la energi-normoj –, kaj ankaŭ la laborkostoj en Nederlando iĝas tro altaj por internacia asocio.

**Plej multaj laborantoj estis** jam maldungitaj aŭ proksimiĝas al pensiĝo. La libroservo iros supozeble al klubo de bone organizitaj slovakoj, la biblioteko kaj la arkivo al la Nacia Biblioteko de Aŭstrio, kiu jam hejmigas Esperanto-muzeon. Jure la asocio tamen ja restas en Roterdamo.

La Esperanto-movado jam 135 jarojn batalas por demokratia formo de internacieco. Ĉu por tio ĝi elektis la ĝustan formon, pri tio eblas diskuti. Sed nun, kiam la Komitato – la plej alta demokratia organo de la asocio – decidis forlasi Roterdamon, venas fino al unu aparta formo de idealismo en la urbo. Adiaŭ.

**Marc van Oostendorp**

*Tradukis István Ertl*



## Paska fontano en la komunumo Schechingen unu de la plej belega paska fontano en la regiono Ostalbkreis

Auf dem Marktplatz, Marktplatz, 73579 Schechingen

Oni tie povas admiri tiun paskan fontanon ornamitan per pli ol 11.000 ovoj (strutaj, anseraj, kokinaj kaj koturnaj).



Akvo estas tiom valoro, pro tio en la antaŭa tempo, printempe la homoj purigis la putojn kaj por danki oni ornamis ilin. En la regiono „*Fränkischen Schweiz*“ la putoj estis ornamitaj per pentritaj paskaj kaj aliaj ornamaĵoj. Ek de 1980, por turismaj celoj, fontanoj ankaŭ en Sud, Mez- kaj Orient-Germanujo estas ornamataj laŭ tiu tradicio – ek de 2002 tiu tradicio alvenis ankaŭ al la komunumo **Schechingen**.

En 1865 pro manko de akvo por homoj kaj bestoj, la *königliche Oberamt* (reĝa supra administrado) decidis konstrui puton je la bazar-placo antaŭ la kastelo, kaj tio kaŭzis ankaŭ la eblon pli beligi tiun placon. Pro tio ili mendis ĉe la *Hüttenwerk Wasseralfingen* la instalaĵojn por tiu puto (kvankam ne tro pompa, tio kostis 1600 guldenojn). La granda akvo-trogo estis ĉirkaŭita de trink-akvaj trogoj por la bestoj ĝis antaŭ kelkaj jaroj. Jam ek de la jaro 1919 la komunumo ricevis la akvon de la

*Landeswasserversorgung* kaj pro tio la puto ne plu estis bezonata. Kaj nun ĝi estas nur fontano.

Per granda honor-ofica forto la ovoj estas elblovitaj kaj poste pentritaj (ĉiuj estas unikaj). 16-20 pentristinoj kaj pentristoj renkontiĝas ek de Oktobro du foje semajne por krei sur kelkaj cent ovoj novajn motivajn bildojn (ĉiu-jare ili estas malsamaj por povi ĝui aliajn ovojn kaj aliaj motivojn). Kelkaj estas vere belegaj artaĵoj.

Tio fariĝis komuna verko de junuloj kaj olduloj, virinoj kaj viroj. La ornamaĵoj estas tre diversaj: ekleziaj motivoj, fabelaj kaj bildstriaĵoj figuroj, vidindaĵoj de la Ostalbkreis kaj la mondo, veneciaj maskoj, motivoj de la pentristoj Chagall, van Gogh, Picasso kaj Rosine Wachtmeister, leporoj, historia varbado, kaj bierspecioj, bestoj, floroj, vizaĝoj, ornamaĵoj, pri amo, eĉ poŝtmarkoj el la tuta mondo.





**Nia foto-paĝo**



Vintro en Slovakio



**Tra la kontinentoj kaj de vintro al printempo.**



**Forsitio anoncas la printempon**



**Les Issambres**



**Mimozoj**



**El Brazilo**

